

KATALUNA ESPERANTISTO

Llengua internacional i drets lingüístics

NÚMERO 371, (núm. 3 de la 6a època) JUNY/JUNIO 2022

WWW.ESPERANTO.CAT

Ludoj, laŭdoj, laŭroj

Petro Nuez, aŭ la boneco

**Carme Cánovas Baños,
l'estima per l'esperanto**

**La llengua islandesa
La islanda lingvo**

Redaktora saluto.....	3
-----------------------	---

LINGVOJ: LA ISLANDA/ LLENGÜES: L'ISLANDÈS

La islanda/ L'islandès.....	4
Januaro en Rejkjaviko / Genera Reykjavík.....	8
La speguloj de la akvoj.....	12
Malgranda lingvo kun grandaj povoj.....	14

LITERATURO/ LITERATURA

Ludoj, laŭdoj, laŭroj.....	16
Malfermita letero al ĉiuj esperanto-poetoj.....	19
Racó de poesia: Lola Casas.....	22
Solaris.....	24
Pro ĝusteco kaj justeco.....	25

HISTORIA MEMORAĴO/ MEMÒRIA HISTÓRICA

Petro Nuez aŭ la boneco.....	26
Cent jarojn antaŭe/ Fa cent anys.....	27
L'esperanto encaixa en l'ideal anarkista.....	28

INTERVJUO/ ENTREVISTA

Carme Cánovas Baños, l'estima per l'esperanto.....	29
--	----

NIA AGADO/ LES NOSTRES ENTITATS

Acte d'homenatge a Montserrat Franquesa.....	32
BAPN, una biblioteca en (re)construcció.....	34
Curs experimental d'esperanto.....	36
Tres mesos de tertúlies esperantistes.....	37
Wordleo.....	39
RenKEJtiĝo.....	40
Celebrem les assemblees ordinària i extraordinària.....	42
XXXIX Congrés Català d'Esperanto. La llarga espera d'un congrés biennal.....	43

ANGULO POR ETERNAJ KOMENCANTOJ EL RACÓ DE L'ETERN APRENT

Interrogatius/ relatius.....	46
------------------------------	----

VILAĜO ESPERANTO

La tri zonoj.....	47
-------------------	----



Foto: Brester Irina / Shutterstock.com

Kataluna Esperantisto és una publicació semestral en català i esperanto de l'Associació Catalana d'Esperanto sobre els drets lingüístics, les llengües de relació internacional, les llengües minoritzades i la història i actualitat de l'esperanto i de les llengües planificades.

Edita: Associació Catalana d'Esperanto
Apartat 1008 - 08200 Sabadell
www.esperanto.cat
info@esperanto.cat

Consell de redacció: Elisabet Abeyà, Xavier Alcalde, Nicolau Dols, Pere Fornells, Xavier Margais, Pedro Martín Burutxaga, Òscar Puig, Alfons Tur, Carles Vela, Sandra Vives

Assessorament lingüístic: Hèctor Alòs (esperanto), Assumpta Mascaró (català)

Composició: Ferriol Macip i Bonet

ISSN de l'edició en paper: 2014-8364

ISSN de l'edició electrònica: 2014-8372

Dipòsit legal: B-27362-1982

Pri la enhavo de la kontribuoj responsas la aŭtoroj mem. Nur la redaktora saluto esprimas opiniojn de la eldonisto KEA. Els autors que signen els articles són els responsables dels seus continguts. L'opinió de KEA només s'expressa a través de l'editorial

Tots els articles estan subjectes a llicència Creative Commons Reconeixement-NoComercial-SenseObraDerivada 2.5 (<http://creativecommons.org/licenses/by-nc-nd/2.5/es/legalcode.ca>). Està permès de reproduir-los i distribuir-los, sempre que es faci sense afany de lucre i se'n reconegui explícitament els autors, i l'Associació Catalana d'Esperanto com a editora

Imprès a: Recordgraf, C/ Mandoni, 6
08004 Barcelona



REDAKTORA SALUTO

Ens trobem a les portes del XXXIX Congrés de l'Associació Catalana d'Esperanto i volem que aquesta revista ens hi acompanyi.

Ens hem trobat amb la tasca impossible de substituir na Montserrat Franquesa per ocupar-nos de la redacció de la revista. Hem intentat conservar les directrius que ella va establir i ens hem demanat moltes vegades com ella hauria resolt algunes de les dificultats que ens han sorgit. Si ens n'hem desfet un poquet ha estat gràcies a la col·laboració generosa i eficient del consell de redacció i de tots els autors, traductors, correctors i dissenyador gràfic. Donem les gràcies a tothom i esperem que els lectors siguin benvolents amb les nostres mancances.

En aquest número trobareu una secció monogràfica amb quatre articles dedicats a la llengua islandesa. Com que els esperantistes som sempre éssers curiosos amb les llengües, hem pensat que us agradaria conèixer algunes particularitats d'aquesta llengua europea que a la Mediterrània ens resulta un poc llunyana i desconeguda.

També comptem amb les seccions ja habituals de *Literatura*, *Memòria històrica*, *Entrevista*, *Racó de l'aprenent*, *Vilaĝo esperanto...* Hi ha moltes col·laboracions a la secció *Les nostres entitats* perquè durant aquest temps s'han fet moltes activitats a KEA, potser perquè hi ha un congrés a la vista!

Podeu veure a la portada el logotip amb les lletres modernistes que encapçalaren la revista *Kataluna Esperantisto* des de 1910 fins a 2002. És la nostra manera d'homenatjar i recordar els qui ens han precedit.

Us desitgem una bona lectura i un bon congrés.

Ni estas ĉe la pordoj de la 39a Kongreso de Kataluna Esperanto-Asocio kaj ni volas, ke tiu ĉi revuo akompanu nin tien.

Ni trovis nin en la neebla tasko anstataŭi Montserrat Franquesa por zorgi pri la redaktado de la revuo. Ni provis sekvi la gvidliniojn, kiujn ŝi fiksas, kaj ni ofte scivolis kiel ŝi solvus kelkajn el la malfacilaĵoj, kiujn ni renkontis. Ni iom eltiriĝis danke al la malavara kaj efika kunlaboro de la redakcianoj kaj ĉiuj aŭtoroj, tradukistoj, lingvkorektantoj kaj grafikisto. Ni dankas ĉiujn kaj esperas, ke la legantoj estos indulgemaj pri niaj mankoj.

En ĉi tiu numero vi trovos monografian sektion kun kvar artikoloj pri la islanda lingvo. Ĉar ni esperantistoj ĉiam scivolas pri lingvoj, ni pensis, ke vi ŝatos koni kelkajn apartaĵojn de tiu ĉi eŭropa lingvo, kiu en Mediteraneo sentiĝas iom malproksima kaj nekonata.

Troviĝas ankaŭ la kutimaj sekcioj *Literaturo*, *Historia Memoro*, *Intervjuo*, *Angulo por eternaj komencantoj*, *Vilaĝo esperanto ...* Ni havas ĉi foje multajn kunlaboraĵojn en la sekcio *Nia agado* ĉar dum tiu ĉi tempo okazis multaj aktivaĵoj ĉe KEA, eble ĉar la kongreso proksimas!

Vi povas vidi frontpaĝe la modernismajn literojn, kiuj titolis la revuon *Kataluna Esperantisto* de 1910 ĝis 2002. Ĝi estas nia maniero honori kaj memori tiujn, kiuj antaŭis nin.

Ni deziras al vi bonan legadon kaj sukcesan kongreson.

Elisabet Abeyà Lafontana
kaj Xavier Margais Basi

LA ISLANDA¹

David Valls Botet
lingvisto

La islanda estas la lingvo parolata en Islando kaj la lingvo parolata de la islandaj elmigrintoj kaj kelkaj el ties posteuloj. Ĉiukaze, en Islando estas 320 000 loĝantoj, ĉiuj parolantaj la islandan. Oni tamen parolis ankaŭ la gaelan frue en la komenco, je la alveno de la unuaj loĝantoj. Dum la 17-a jarcento, ekzemple, oni parolis eŭsko-islandan piĝinon. Ni memoru ke piĝino estas miksaĵo de aliaj lingvoj, kutime havanta nur specifajn celojn, kaj kiun oni ne transdonas de gepatroj al gefiloj. Kiam piĝinon oni transdonas familie, tiam ĝi

fariĝas kreollingvo, lingvo kiu, krome, uziĝadas ĉiucele kaj ne nur specife.

Tiel do, tiu eŭsko-islanda piĝino, kiu, fakte, ankaŭ entenis vortojn el la germana, franca, angla kaj hispana, estis uzata inter eŭskoj kaj islandanoj por komercadi kaj interkompreniĝi. Ĉefe temis pri eŭskaj balenkaptistoj kiuj atingis la islandan marbordon postsekvante balenojn.

Sed ni revenu al la islanda, ĝermana lingvo, parenca al la angla kaj la germana, kvankam pli proksima al la

norvega, ekzemple, ĉar ĝi apartenas al la skandinaviaj lingvoj. Fakte, la islanda devenas de la antikva norvega, kiu, siatempe, estigis la modernan norvegan kaj la islandan. Nepras mencii ke ĉiuj ĉi lingvoj apartenas al la hind-eŭropa familio, kiel la kataluna, kaj tial ili parenkas.

La islanda malhavas apartajn dialektojn, tio signifas ke en la tuta insulo oni parolas la saman islandan. Estas kurioza fakto ĉar Islando estas granda insulo. Tamen, se ni revenas al la eŭska, ni konstatas ke ĝi havas ses

1 Tiu ĉi estas ĉapitro de la libro *Les llengües de l'Anaconda* [La lingvoj de la anakondo]. David Valls Botet. Eld. Viena. Barcelono: 2018



L'ISLANDÈS¹

David Valls Botet
lingüista

L'islandès és la llengua que es parla a Islàndia i la llengua que parlen també els islandesos emigrats d'Islàndia i alguns dels seus descendents. En tot cas, a Islàndia hi ha 320.000 habitants, els quals tots parlen l'islandès. Però també s'hi havia parlat gaèlic molt al principi, a l'arribada dels primers habitants. Durant el segle XVII, per exemple, s'hi havia parlat un pidgin bascoislandès. Recordem que un pidgin és una llengua que és una barreja d'altres llengües, que normalment té uns usos determinats, i que no es transmet de

pares a fills. Si un pidgin es transmet de pares a fills, llavors passa a ser una llengua criolla, llengua que, a més, s'utilitza per a tot i no només per a uns usos determinats.

Així doncs, aquest pidgin bascoislandès, que, de fet, també contenia paraules d'altres llengües com l'alemany, el francès, l'anglès i el castellà, es feia servir entre bascos i islandesos per comerciar i poder-se entendre. Sobretot eren baleners bascos que empaitant balenes arribaven a les costes d'Islàndia.

Però tornem a l'islandès, que és una llengua germànica, emparentada amb l'anglès o l'alemany, tot i que és més pròxima al noruec, per exemple, ja que pertany a les llengües escandinaves. De fet, l'islandès deriva del noruec antic, que, amb el temps, va donar origen al noruec modern i a l'islandès. Cal dir que totes aquestes llengües són indoeuropees, com el català, i per tant estan emparentades.

L'islandès no té variants dialectals apreciables, això vol dir que a tota l'illa es parla el mateix tipus d'islandès.

¹ Aquest és un capítol del llibre *Les llengües de l'Anaconda*. David Valls Botet. Viena Edicions. Barcelona: 2018

dialektojn en multe pli malvasta teritorio. Memkompreneble la eŭska estis kaj daŭre estas sub diversaj politikaj regoj kaj havis kontakton kun multaj lingvoj, kiel la latina, la araba, la hispana kaj la franca. La islanda estas lingvo kiu restis ege pura pro la plurjarcenta izolo de Islando.

La islanda estas konsiderata ege konservativa kaj prezentas trajtojn de aliaj parencaj lingvoj jam malaperintaj. Ekzemple, la deklinacio estas kvar-kaza. Substantivojn oni deklinacias laŭ kazo, nombro kaj genro. Ekzistas ege interesa retpaĝo (bin.arnastofnun.is/) kie oni povas enmeti vorton kaj ĝi montras ĉiujn eblajn vortoformojn. Ekzemple, por vorto kiel *maður* ('persono'), ĝi redonas singularon kaj pluralon en nominativo, akuzativo, dativo kaj genitivo. Por adjektivo kiel *hvítur* ('blanka'), ĝi provizas imponan tabelon kun ĉiuj eblaj kombinoj en kazo, nombro kaj genro (vira, ina kaj neŭtra), forta kaj malforta fleksio kaj la formoj en pozitivo, komparativo kaj superlativo. El verbo kiel *tala* ('paroli'), ĝi afiŝas la tutan konjugacion. Ankaŭ ĝi deklinacias proprajn nomojn: tiel ankaŭ eblas enskribi *Katalónia* aŭ *David*.

Alia kuriozaĵo de la islanda estas ke ĝi praktikadas iaspecan lingvan purismon, tial ĝi ne prunteprenas el aliaj lingvoj, sed ĝi kreas novajn vortojn el propraj radikoj. En la kazo de la islanda, tio estis tendenco kiu plifortiĝis dum la 19-a jarcento kun la celo purigi la lingvon de danaj vortoj kaj nun daŭre daŭrigas sian krucmiliton, se oni rajtas tiel diri, pri la angla. Oni devas agnoski ke la islandanoj estas ege "lingvema" popolo ĉar jam en la 12-a jarcento publikiĝis gramatiko nomata *Fyrsta Málfræðiritgerðin* [Unua gramatik-traktato]. Tiel do, la Íslenskmalstöð aŭ Instituto de la Islanda Lingvo respondecas pri la kreado de neologismoj surbaze de la propraj rimedoj de la islanda lingvo. Same kiel Termcat pri la kataluna, tamen katalune la maniero krei neologismojn estas alia, ĉar ni alproprigas pruntvortojn laŭ la katalunaj fonetiko kaj ortografio, kvankam foje ankaŭ

”

La islanda estas bona ekzemplo de lingvo kun malmultaj parolantoj kiu povas perfekte vivi kaj esti tute normale uzata en ĉiuj sociaj sferoj

ni kreas vortojn pere de niaj propraj lingvaj rimedoj, reakirante malnovajn neuzatajn vortojn kaj donante al ili novan signifon per ampleksigo de la semantika kampo. Ni uzas ankaŭ latinajn aŭ helenajn radikojn.

Ekzemple, islande por diri *telefono* (el la malnovgreka *tele* kaj *fon*) oni diras *sími*, malnova neuzita vorto, kiu signifis "longan fadenon". *Meteorologio* estas *veðurfræði*, vorto kreita el *veður* ('vetero') i *fræði* ('scienco'). *Komputilo* estas *tölva*. Tiu ĉi vorto devenas el *tala*, signifanta 'numeron', kaj *volva*, kiu estas iaspeca sorĉistino aŭ virino divenanta la estonton. Ekzistas eĉ versio de la islanda lingvo nomata *altislanda* lanĉita de belgo, kiu pretendas fari la islandan lingvon eĉ pli pura kaj sena de fremdvortoj. Tiel, oni eĉ proponas islandajn nomojn por ne-islandaj urboj: *hæðir* 'Sep montetoj' = Romo), *Góðviðra* ('Bonaj Aeroj' = Bonaero), sed estas ege minoritata tendenco, neoficiala kaj la plimulto de la ordinaraĵoj ne sekvas ĝin.

Plia kuriozaĵo de la islanda estas la antaŭ- kaj familinomoj. Unue, kiam oni volas nomi novnaskiton, la uzota nomo devas esti agnoskita de la *Mannanafnanefnd*, kiu estas Islanda Nomkomitato. Oni postulas ke la nomoj estu kongruaj al la gramatiko kaj fonetiko de la islanda lingvo, ili devas esti deklinacieblaj kaj devas enteni literojn ekzistantajn en la islanda alfabeto. En la jaro 2012 ekzistis registro kun 1712 viraj nomoj kaj 1853 inaj.

Pri la familiaj nomoj, la afero funkcias jene. En Katalunio oni transdonas la familiajn nomojn de gepatroj al gefiloj, tiel la familiaj nomoj plurestas. Nun, krome, eblas meti en la unuan lokon la patran aŭ patrinan familian nomon kaj, ĉiukaze, la filo aŭ filino povas poste ŝanĝi la ordon laŭvole. En Islando la gefiloj prenas la antaŭnomon de la patro (en certaj kazoj povas esti tiun de la patrino), kaj tiu estas uzata kvazaŭ familia nomo kun la aldonado de la vorto 'filo' aŭ 'filino'. Tiun sistemon oni uzis en aliaj skandinaviaj kaj en slavaj lingvoj, same kiel en multaj aliaj lokoj dise tra la mondo ĝi ankoraŭ funkcias. Tiel, ekzemple, se sinjoro nomata Magnús havas filon kiun li nomas Jón, la filo nomiĝos "Jón Magnússon", kaj se temas pri filino nomata Maria, ŝi nomiĝos "Maria Magnúsdóttir".

La islanda estas bona ekzemplo de lingvo kun malmultaj parolantoj kiu povas perfekte vivi kaj esti tute normale uzata en ĉiuj sociaj sferoj. Tiel do, nedubinde la islanda estas lingvo, male al la kataluna, rolanta en ĉiuj sferoj de la islanda socio, en televido, radio, gazetaro, komerco, etiketado ktp. Sekve, en Islando, kvankam oni nombras nur iom pli ol 300 000 loĝantojn (malpli ol la tuta provinco Lleida, kiu havas ĉirkaŭ 440 000), eblas vivi sciante nur la islandan, male al Lleida, kie ne eblas vivi nur katalunlingve, aŭ en la okcitana se oni loĝas en la Arana valo. ■

Tradukis: Alfons Tur

dès. És un fet curiós perquè Islàndia és una illa molt gran. En canvi, si tornem al basc, veiem que té uns 6 dialectes, essent un territori molt més petit. És clar que el basc ha estat i està sota diverses administracions polítiques i ha tingut i té contacte amb moltes llengües, com el llatí, l'àrab, el castellà i el francès. L'islandès és una llengua que s'ha mantingut molt pura per causa de l'aïllament d'Islàndia durant els segles.

L'islandès és una llengua que es considera molt conservadora i que té trets que en d'altres llengües emparentades ja han desaparegut. Per exemple, les declinacions tenen 4 casos. Els noms es declinen per cas, nombre i gènere. Hi ha un web molt interessant (bin.arnastofnun.is/) en què pots posar una paraula i t'ensenyà totes les declinacions possibles. Per exemple, d'una paraula com *maður* ('persona'), et dona singular i plural en nominatiu, acusatiu, datiu i genitiu. D'un adjectiu com *hvítur* ('blanc'), et dona un quadre impressionant amb totes les combinacions de cas, nombre, gènere (masculí, femení i neutre), flexió forta i feble i les formes en positiu, comparatiu i superlatiu. D'un verb com *tala* ('parlar'), et dona tota la conjugació. I també declina noms propis; així podem posar-hi *Katalónia* o *Davið*.

Una de les curiositats de l'islandès és que és una llengua que podríem dir que practica el purisme lingüístic, que el que fa és que no agafa manlleus d'altres llengües, sinó que crea noves paraules des d'arrels pròpies de la llengua. En el cas de l'islandès, és un moviment que es va accentuar al segle XIX per depurar l'islandès de paraules daneses i que ara continua la seva croada, si ho podem dir així, amb l'anglès. Cal dir que els islandesos són un poble força "lingüístic", ja que al segle XII ja hi va sortir una gramàtica anomenada *Fyrsta Málfræðiritgerðin* (Primer tractat de gramàtica). Així doncs, l'Íslensk málstöð o Institut de la Llengua Islandesa és l'encarregat de crear els neologismes a partir de recursos propis de la llengua islandesa. És com el que fa el Termcat amb

”

L'islandès és un bon exemple de com una llengua amb pocs parlants pot estar perfectament viva i tenir un ús completament normal en tots els àmbits socials.


el català, només que en català la forma de crear neologismes és diferent, ja que nosaltres adaptem manlleus a la fonètica i a la grafia del català, tot i que alguna vegada també en creem algun amb recursos propis de la llengua, com ara recuperant alguna paraula antiga en desús i donant-li un nou significat a través d'una ampliació del seu camp semàntic. També fem servir arrels llatines o gregues.

Per exemple, en islandès per dir *tel·lèfon* (del grec *tele* i *fon*) diuen *sími*, que és una paraula antiga, que estava en desús i que vol dir 'fil llarg'. *Metereologia* es diu *veðurfræði*, que és una paraula formada per *veður* ('oratge') i *fræði* ('ciència'), *ordinador* és *tölva*. Aquesta paraula ve de *tala*, que vol dir 'número', i *volva*, que és com una mena de bruixa o dona que endevina el futur. Hi ha una versió de l'islandès que es diu *alt islandès* i que la promou un belga, que encara vol fer de l'islandès una llengua més pura i més neta d'estrangerismes. Així, fins i tot, proposen noms en islandès per a ciutats no islandeses: *Sjöhæðir* ('Set turons' = Roma), *Góðviðra* ('Bons Aires' = Buenos Aires), però és un corrent molt petit de gent, que no és oficial i la gent del carrer no segueix aquesta tendència.

Una curiositat més de l'islandès és el funcionament dels noms i dels cognoms de persona. Per començar, quan vols posar un nom a un nou-nat, aquest ha de ser un nom dels que consten com a aprovats pel *Mannanafnanefnd*, que és el Comitè Islandès de Noms. Les característiques dels noms és que han de ser compatibles amb la gramàtica i la fonètica de la llengua islandesa, s'han de poder declinar i han de tenir lletres que apareguin a l'alfabet islandès. L'any 2012 hi havia un registre de 1.712 noms per a homes i 1.853 per a dones.

Quant als cognoms, la cosa funciona de la manera següent. A Catalunya els cognoms els anem passant de pares a fills, així els cognoms van perdurant. Ara, a més, pots triar de posar primer el cognom del pare o de la mare i, en qualsevol cas, el fill es pot canviar l'ordre sempre que vulgui. A Islàndia els fills agafen el nom del pare, en alguns casos pot ser el de la mare, i aquest s'utilitza de cognom amb l'afegit darrere de la paraula fill o filla. Aquest és un sistema que s'havia utilitzat en les altres llengües escandinaves i en les llengües eslaves, i a molts altres llocs del món on encara s'utilitza. Així, per exemple, si tenim un senyor que es diu Magnús i té un fill al qual li posa Jón, el fill es dirà Jón Magnusson, i si té una filla i li posa de nom Maria, es dirà Maria Magnúsdóttir.

L'islandès és un bon exemple de com una llengua amb pocs parlants pot estar perfectament viva i tenir un ús completament normal en tots els àmbits socials. Així doncs, no cal dir que l'islandès és una llengua, que a diferència de la catalana, és present a tots els àmbits de la societat islandesa, a la televisió, a la ràdio, a la premsa, al comerç, a l'etiquetatge, etc. Per tant, a Islàndia, tot i haver-hi poc més de 300.000 habitants, menys habitants que en tota la província de Lleida, que en són uns 440.000, s'hi pot viure només sabent l'islandès, fet que contrasta amb la província de Lleida, on no es pot viure només en català, o en aranès si ets habitant de la Vall d'Aran. ■



JANUARO EN REJKJAVIKO¹

Albert Herranz Hammer

verkisto

(...) La historio de la lingvaj najbaroj de la islanda estas senkonsoliga. Rande de maro kie la skandinaviaj lingvoj ekzistis sen ajna minaco hodiaŭ sentiĝas la truda superrega ĉeesto de la angla. La islanda lingvo estas endanĝerigita, same kiel la feroa, pro la premo de turismo. Por ambaŭ lingvoj la fato de la norna estas harhirtiga ek-

zemplo de kio povas okazi al ili du. La norna estas skandinavi-devena lingvo parolita en Ŝetlando. Nuntempe de ĝi troveblas nur kelkaj atestaj restaĵoj. Loknomoj kiel ĉiam estas la unua signo sur la landkartoj, tute ruĝa, de alia ĉeesto kiu estas nek la angla nek la gaela: Lerwick, Sandwick, Foula... Loĝanto de la eta insulo Fair ne finas la frazojn laŭ la angla stilo “you see?”, sed laŭ la pli skandinavia maniero “see you?”. Kiu aŭdas unuafoje la ŝetlandan dialekton, tiu povas pensi

ke temas pri skota parolo sed ĝi ne estas tia. Dissemitaj en la parolo troviĝas vortoj konataj de skandinavi-lingvano, kiel *voer* (‘printempo’, svede *vår*), *du* (‘vi’ kiel en la sveda, dum *you* estas ĉefe uzata kiel respekta formo), *hirst* (‘aŭtuno’, *host*), *dim* (‘nebulo’, *dimma*). Por multaj eksteruloj, kompreni la ŝetlandan dialekton malfacilas. Kvankam ĝi estas konsiderata unu el la signoj de aparta identeco, la ŝetlanda travivas malfacilajn tempojn. Tamen, antaŭ kelkaj jardekoj ekzistis

¹ Ero de la libro: *Gener a Reykjavík* [Januaro en Rejkjaviko]. Albert Herranz Hammer. Eld. Calumnia, 2020.



MARCEL DOMÍNG

GENER A REYKJAVÍK¹

Albert Herranz Hammer
escriptor

(...) La història dels veïns lingüístics de l'islandès és desoladora. A un mar on les llengües escandinaves existien sense cap amenaça avui hi ha la presència dominadora de l'anglès. L'islandès està en perill igual que el feroès davant la pressió que significa el turisme. Per a totes dues llengües el destí del norn és un exemple esfereïdor del

que pot passar amb les seves. El norn és una llengua d'origen escandinau que es parlava a les illes Shetland. Avui en dia només en queden petits testimonis. Els topònims com sempre són la primera senya als mapes, ben vermella, d'una altra presència que no és ni l'anglès ni el gaèlic: Lerwick, Sandwick, Foula... Un habitant de la petita illa de Fair Isle no acaba les frases a la manera anglesa *you see?* Sinó d'una forma més escandinava *see you?* El qui sent per primera vegada el di-

alecte de les Shetland pot pensar que és un parlar escocès però no ho és. Disseminades en el parlar hi ha paraules que, per a un parlant escandinau, són ben familiars, com *voer* (primavera, en suec *vår*), *du* (tu, igual en suec, *you* s'utilitza més com a vostè), *hirst* (tardor, *host*), *dim* (boira, *dimma*). Per a molts d'externs, entendre el dialecte shetlandès és difícil. Tot i que és considerat una de les seves senyes d'identitat més evidents, el shetlandès viu moments molt baixos. Tot

¹ Fragment del llibre: *Gener a Reykjavík*. Albert Herranz Hammer. Calumnia edicions, 2020.

intereso lerni la feroan en la insularo, ĉar tiu lingvo estas vidata kiel la plej proksima al la malaperinta norna.²

Ironie, nova leĝo enkondukanta la instruadon en la lernejoj de la minacata skotgaela forviŝos la lastajn spurojn de lingvo parolata en tiuj insuloj ĝis la 18-a jarcento. Ĉu tiu estas la sorto de la islanda? Dum mi skribas ĉi tiujn vortojn mi troviĝas en la Nordia Domo en Rejkjaviko. Temas pri impona konstruaĵo apud la nacia Historia Muzeo kaj diversaj universitataj konstruaĵoj. Ekstere flirtas la diversaj flagoj de la nordiaj landoj de Alando ĝis Gronlando. Ene troviĝas biblioteko, kiu prezentas literaturon kaj gazetojn el tiuj landoj, ekspoziciejoj, kafejo kaj diversaj oficejoj, kie deĵoras diversfakaj doktoriĝantoj kaj katedrestroj. La konstruaĵo, kreita de la arkitekto Alvar Aalto, estis lia lasta verko. Tiaj kulturaj centroj plifirmigantaj la kunlaboron kaj interrilatojn inter la nordiaj landoj troviĝas dise tra la tuta nordia geografio, sed la rejkjavika estis la unua. Kial? Ĉar kiam oni inaŭguris ĝin en aŭgusto 1968, oni volis fari intencdeklaron. Oni timis ke la islanda kulturo estos viktimita de la angla. Nepris plifirmigo de la propra lingvo kaj de la nordia identeco.

Nun, kaŭze de turismo –tiam la influo estis de la usona milita bazo en Islando– la angla minacas denove la lingvon.

Mi renkontas la poetinon Gerður Kristný Guðjónsdóttir. Ni rendevuis en librejo-kafejo de Rejkjaviko. La libroj estas alte aprezataj en tiu ĉi lando. Kiam mi alvenas kaj demetas la gantojn kaj koltukon, Gerður kaptas kaj trastudas ilin. Estas du trikaĵoj.

2 La feroa lingvisto Jakob Jakobsen studis kaj diskonigis la nornan en sia verko *Det norrøne sprog paa Shetland*. Li malkovris 10 000 vortojn specife ŝetlandajn. Li faris ankaŭ interesajn studojn pri la lingvo en la Orkadoj. La lasta denaska parolanto de la norna forpasis en 1850.

Poste ŝi lasas ilin kaj min gratulas. Antaŭ mia mirmieno ŝi rakontas ke en Islando kiam iu volas montri aprezon por iu alia oni donacas libron aŭ trikas vestaĵon. Kaj, efektive, tion mi konstato dum miaj tagoj en la lando. Ĉiuj trikadadas. La virino kiu vendas enirbiletojn de la marmuzeo, du viroj dum koncerto, ĵurnalistino atendanta la ekon de preskonferenco aŭ, por mi la plej ŝika, viro en kafejo dum bierumado trikas, kaj legas libron helpe de pupitro!

Kiam ni parolas pri turismo la mieno de Gerður aliĝas. Ŝi agnoskas ke ĝi estis bona ekonomia antaŭenpuŝo por la lando. Lando kiu ekonomie sinkis post la krizo de 2008. Ŝi tamen esprimas maltrankvilon pro la ŝanĝoj okazantaj en la ĉefurbo. Ŝi rakontas, parte surprizita kaj parte ofendita, kiel ŝi spertis problemojn por esti priservita en la islanda en vendejo. Ĉar, kvankam ŝi scipovas la anglan, ŝi rifuzis paroli angle kaj postulis islandlingvan komizon. “En la urbo-centro!” ŝi diris. Ne malfacilas skizi paralelismen, bedaŭrinde, kun la situacio de nia lingvo en Majorko. En certaj lokoj, kiel Palma, paroli kaj esti priservata en la loka lingvo estas vera aventuro. Kaj ne nur tie kie sentiĝas forta turisma premo la kataluna malaperas kaj ankaŭ la lingvaj rajtoj de ties geparolantoj. Kelkajn monatojn poste, somere, en Formentero oni rifuzis priservi la poetinon Carles Rebasas pro la fakto ke li parolis katalune. Kaj la reagoj malmultis. Ne ĉar tiaj situacioj maloftas, male ili abundas. Same kiel okazas pri la naturo, la batalo ŝajnas perdita kaj malmulto fareblas.

En la tradicia jarfina prelego (2017), la islanda prezidanto Sigður Ingi Jóhannsson, esprimis sian zorgon pro la fakto ke la islanda povus malaperi post cent jaroj. Tiu deklaro estis eble la unua oficiala montro de maltrankvilo pri la statuso de la lingvo en la insulo. La profesoro pri la islanda lingvo Eiríkur Rögnvaldsson asertis la samon du jarojn pli frue kiam li rimarkis la islandan en eŭropa dosiero kiel unu el la kvar plej minacataj lin-

gvoj en Eŭropo kaŭze de manko de ciferecigo.³

Cent jaroj estas numero ofte menciata en la historio de la islanda lingvo. Rasmus Rask⁴ estis dana lingvisto kiu vizitis la insulon dum la jaroj 1813-15. Li verkis la unuan islandan gramatikon –ankaŭ li verkis aŭ kreis la bazon de la feroa, tial la similecoj–. Li resumis sian opinion pri la estonto de la lingvo per la jena sentenco: “Post cent jaroj, ĝi ne plu ekzistos”. ■

3 La studo META-NET estis ellaborita de pli ol 200 fakuloj. Ĝi taksas la teknologiajn rimedojn de la lingvoj en kvar malsimilaj areoj: aŭtomata tradukado, tekstanalizo, dispono de lingvaj rimedoj kaj perva interagado. La lingvoj islanda, latva, litova kaj malta situas en la stadio de “cifereca subteno malforta aŭ neekzistanta”, kio metas ilin en risko de cifereca malapero. Laŭ tiu studo, la kataluna –kune kun la eŭska, la hungara kaj la pola– situas en stadio de cifereca subteno “parta”. Nur la angla ricevas la konsideron de cifereca “bonsato”, dum lingvoj kiel la franca, la hispana aŭ la germana ricevas la konsideron de “modera cifereca subteno”. Tridek el la okdek agnoskitaj lingvoj en Eŭropo partoprenis la studon.

4 Rasmus Rask (1787-1832) publikigis la unuan islandan gramatikon post vojaĝo al la insulo. En sia filologia traserco li vojaĝis de Rusio ĝis Hindio. Oni konsideras lin la fondinto de la lingvistiko kaj estas konata pro la formuligo de la poste nomata leĝo de Grimm. Kiel anekdoto oni povas rakonti ke kiam li hejmevenis post liaj multnombraj esplorvojaĝoj, la kopenhagaj saĝuloj volis scii nur ĉu li rajdis sur elefanto kaj kia estis tiu sperto.

i així, fa unes dècades hi havia un interès per aprendre feroès a les illes ja que aquest idioma és considerat com el més proper a l'extint norn.²

Irònicament, una nova llei que implementarà l'ensenyança a les escoles de l'amenaçat gaèlic escocès acabarà amb els darrers vestigis d'una llengua que es va parlar en aquestes illes fins al segle XVIII. És aquest el destí de l'islandès? Quan escric aquestes paraules som a la Casa Nòrdica de Reykjavík. És un edifici imponent devora el Museu d'Història del país i de diversos edificis universitaris. Als afores onegen les distintes banderes dels països nòrdics des d'Åland fins a Groenlàndia. A dins hi ha una biblioteca amb la literatura i premsa d'aquests països, sales d'exposicions, cafeteria i distintes oficines on treballen doctorands i catedràtics de distintes disciplines. L'edifici, que va ser dissenyat per l'arquitecte Alvar Aalto, va ser la seva darrera obra. De centres culturals com aquest que refermen la col·laboració i l'intercanvi entre els països nòrdics, n'hi ha per tota la geografia nòrdica, però la casa de Reykjavík va ser la primera. Per què? Perquè quan es va inaugurar, l'agost de 1968, es va voler fer una declaració d'intencions. Hi havia por que la cultura islandesa caigués víctima de l'anglès. S'havia de refermar la seva llengua i identitat nòrdica.

Amb el turisme –llavors era la influència de la base militar dels EUA a Islàndia– l'anglès torna actualment a amenaçar la llengua.

Em trobo amb la poeta Gerður Kristný Guðjónsdóttir. Hem quedat a una de les llibreries cafeteries que hi ha a Reykjavík. L'estima pels llibres

és alta en aquest país. Quan arribo i em llevo els guants i el buf, Gerður els agafa i els estudia. Són dues peces teixides. Després les deixa i em dona l'enhorabona. Davant la meua cara de sorpresa m'explica que a Islàndia quan una persona vol mostrar estimació per una altra o bé li regala un llibre o bé teixeix una peça de roba. I, efectivament, això és una cosa que comprovaré al llarg dels meus dies al país. Tothom teixeix. La dona que et ven entrades al museu marítim, dos homes a un concert, una periodista mentre espera que una roda de premsa comenci o, aquest per a mi el més sofisticat, un home en un cafè que mentre pren una cervesa i teixeix, llegeix un llibre amb l'ajuda d'un faristol!

Quan parlem del turisme la cara de Gerður canvia. Reconeix que ha donat una bona empenta econòmica al país. Un país que estava enfonsat econòmicament des del crac econòmic del 2008. De totes maneres expressa una preocupació per com està canviant la capital. Em conta, entre sorpresa i indignada, com va tenir problemes per ser atesa en islandès a una tenda. Com, tot i saber anglès, es va negar a parlar en anglès i va demanar que algú l'atengués en islandès. “Això al centre!” em comenta. No és molt difícil traçar paral·lelismes, desgraciadament, amb el que passa amb la nostra llengua a Mallorca. Hi ha indrets, com Palma, on parlar i ser atès en la llengua del país és una autèntica odissea. I no tan sols allà on hi ha alguna forta presència turística el català s'esvaeix i també els drets lingüístics dels seus parlants. Uns mesos més tard, a l'estiu, a Formentera es negaren a atendre el poeta Carles Rebassa pel fet de parlar en català. I les reaccions, escasses. I no perquè siguin poques les vegades que passen sinó perquè ja són múltiples i, com també ens passa amb la natura, sembla que tot el peix està venut i hi ha poca cosa a fer.

Al discurs tradicional de Cap d'Any (2017), el president islandès Sigður Ingi Jóhannsson, va expressar la seva preocupació pel fet que l'islandès po-

gués desaparèixer d'aquí a cent anys. Aquesta declaració ha estat probablement la primera mostra oficial de preocupació sobre l'estatus de la llengua a l'illa. El professor en llengua islandesa Eiríkur Rögnvaldsson va afirmar el mateix dos anys abans en veure que l'islandès figura dins un informe europeu com una de les quatre llengües més amenaçades d'Europa per manca de suport digital.³

Els cent anys són una xifra molt recurrent en la història de la llengua islandesa. Rasmus Rask⁴ va ser un lingüista danès que va visitar l'illa entre els anys 1913-15. Fou l'autor de la primera gramàtica islandesa –també escriuria o faria les bases del feroès, d'allà les semblances–. Va resumir la seva opinió sobre el futur de l'idioma amb una sentència: “En cent anys, ja no existirà”. ■

3 L'estudi META-NET està elaborat per més de 200 experts. Avalua el suport tecnològic dels idiomes des de quatre àrees diferents: traducció automàtica, anàlisi textual, disponibilitat dels recursos lingüístics i interacció amb la veu. Les llengües islandesa, letona, lituana i maltesa van ser considerades en situació de “suport digital feble o inexistent”, la qual cosa les col·loca en perill d'extinció digital. Segons aquest estudi, el català –juntament amb el basc, l'hongarès o el polonès– està en una situació de suport digital “fragmentària”. Només l'anglès rep la consideració de “bon suport” digital, mentre llengües com el francès, el castellà o l'alemany reben la consideració de “suport digital moderat”. Trenta de les vuitanta llengües reconegudes a Europa participaren en l'estudi.

4 Rasmus Rask (1787-1832) va publicar la primera gramàtica islandesa després d'un viatge a Islàndia. En la seva recerca filològica va viatjar de Rússia a l'Índia. És considerat com el pare de la lingüística i és conegut per formular el que més tard es va conèixer com la llei Grimm. Com a anècdota podem explicar que quan va tornar dels seus nombrosos viatges científics, els savis de Copenhaguen només estaven interessats a saber si havia muntat en elefant i com va ser aquesta experiència.

2 El lingüista feroès Jakob Jakobsen va estudiar i donar a conèixer el norn al seu treball *Det norrøne sprog paa Shetland*. Va descobrir 10.000 paraules que eren específiques de les illes Shetland. També va fer interessants estudis sobre la llengua a les illes Orkney. El darrer parlant que tenia el norn com a llengua materna va morir el 1850.

LA SPEGULOJ DE LA AKVOJ - AŬ MIA SPERTO PRI LA ISLANDA

Nicola Ruggiero

poeto kaj instruisto



KERSTIN WESSER-BUCHHOLZ

Mi ankoraŭ memoras kiam ĉe mia frua esperantistigo mi legadis la versojn de Baldur Ragnarsson. Ili estis tre apartaj ol tiuj de ekzemple Kalocsay kaj Auld pro tio, ke ili kondukis mian menson kaj koron al idekunligoj kiujn mi ankoraŭ ne spertis. En 2006 Mauro Nervi petis de mi eseeton pri la islandano kaj aperigis ĝin en “La serena lingvo”, la (ĝis tiam) plenverkaro de la poeto. Lin mi ekkonis persone en la domĝardeno de Nervi en Pisa, kie okazis itala kongreso kaj la poeto estis la ĉefgasto kaj ĉefpreleganto.

La vivo estas mistero. Iom poste mi enamigis al knabino kiu ekloĝis en Islando kaj mi decidis viziti la landon kaj poste resti. Tio okazis en 2008, kiam fortega krizo bankrotigis la landon, multaj perdis sian postenon kaj esperon... tamen, mi estis juna kaj min ĉirkaŭis amika rondo. Mi sciis, ke por trovi ajnan laboron mi bezonis lerni la lokan lingvon, la islandan. Dum vespermanĝo ĉe la poeto, lia edzino, la

karmemora Þórey Kolbeins rakontis, ke ŝi dum multaj jaroj instruis la lingvon al eksterlandanoj, kaj mi demandis ĉu ŝi pretus instrui ankaŭ al mi. Tiel okazis, ke mi havis eksterordinaran instruistinon. Iom post iom kaj tre pacience ŝi instruis al mi la bazan gramatikon. Ŝi estis emerita infanĝardena instruistino specialistiĝinta pri infanoj handikapitaj aŭ kun lingvoproblemoj kaj se mia prononcado ankoraŭ vekas estimon, mi ŝuldas tion al ŝi. Krome, ŝi mem pretigis lernolibreton kun ĉarmegaj bildoj desegnitaj de la filo Halldór, kiu intertempe iĝis tre konata satirdesegnisto en islandaj ĵurnaloj. Tamen, la komenco estis tre malfacila. Kvankam juna, mi estis tre timema alpaŝi eĉ butikon kaj alparoli en la islanda. Danke al mia tiama koramikino, mi pruntis librojn kaj sonlibrojn el la urbaj bibliotekoj kaj aŭskultis, legis, provis kompreni... sed laborintervjuoj fiaskis senĝlore.

Alvenis epifanio, aŭ renaskiĝo se uzi vortojn de Þórbergur Þórðarson, sed

en... Danio. Dum la Kultura Esperanto-Festivalo mi renkontis francon kaj danon kiuj ekparolis en la islanda kaj... ne nur mi komprenis, sed mi enmiksiĝis kaj babilis kun ili. Subite, mi min sentis senhonta kaj eĉ iom aroganta pri mia lingvonivelo. Reveninte al Islando, mi rekandidatiĝis por posteno en urba infanĝardeno simple frapante ĉe la pordo de la lernejestrino kaj parolante nur en la islanda. Jes, memkompreneble je ĉiu dua vorto mi eraris: malĝustaj deklinacioj kaj miskonjugaciitaj verboj aperis kiel fungoj, sed mia provo sukcesis. Mi ekhavis la laboron kaj maldungiĝis de la barata restoracio kie mi kelneris.

Mi ne haltis. Mi ne povis. Mia vortprovizo tro magris, tiel ke mi apenaŭ povis nomi nur kelkajn aferojn en la laborejo aŭ paroli kun la infanoj kaj la kolegoj. Mi eklernis rimajojn kaj infankantojn. Mi pruntis librojn kaj laŭtleĝis al la infanoj. Mi mem lernis dum ili lernis, aŭ fakte: asimilis la lingvon.

Ĉio ŝajnis bela rozejo: min ĉirkaŭis nedorlotitaj infanoj kaj kolegoj emaj toleri miajn demandojn kaj nekompreneojn aŭ eĉ miskomprenojn. La saman tagon kiam mi subskribis la longtempan kontrakton, alproksimiĝis al mi koleginino kiu demandis “Nennirðu að ganga frá?” kiun mi tradukis laŭlitere “Ĉu vi emas iri el?”. Mi kolerete reagis, ke mi tute ne intencis foriri, ke mi eĉ tiun saman tagon subskribis kontrakton kaj... ŝi tuj haltigis kaj klarigis en la angla, ke ŝi nur demandis ĉu mi emas purigi kaj ordigi la ĉambron anstataŭ ŝi. Mi ruĝiĝis kaj pardonpetegis; memkompreneble mi purigis kaj ordigis ĉion.

Bela rozejo, sed ja kun dornoj. Kred-eble oni ŝuldas je la lernejo-sistemoj, ke gramatikaj eraroj, eĉ se farataj de nebagatela homkvanto, estas motivo por skoldo kaj ridindigo en publika placo. Je mia scio, estis nur tri kolegoj kiuj mokis kaj priridis min. Nur kun ili mi sentis min fremdulo en la rondo. Dornoj vundas sed ankaŭ instruas.

”
Mi ekdecidis studi la islandan en universitato kaj ankoraŭfoje mi renaskiĝis

Mi ekdecidis studi la islandan en universitato kaj ankoraŭfoje mi renaskiĝis. Por viziti la lecionojn kaj plu vivteni min, mi iĝis noktogardisto en urba loĝejaro por skizofreniuloj.

Dum tiuj longaj noktoj post aŭ inter miaj taskoj mi studis, legis, spektis filmojn kaj plu lernis la lingvon kaj ties literaturon. Post longa serĉado, mi trovis kaj aĉetis la islandlingvajn poemarojn de Baldur Ragnarsson. Dum mi

legis, mi havis strangan senton, nome ke tiuj vortoj ŝajnis al mi jam konataj por fine kompreni, ke tiujn vortojn mi trovis jam en liaj esperantlingvaj versoj. Mi trovis la temon por mia bakalaŭriĝo! Kiam mi kuraĝis alfronti Jón Karl Helgason, mian profesoron pri literaturo, mi apenaŭ kredis je miaj oreloj kiam li neis iĝi mia mentoro sed ke samtempe eble li konas esploriston kiu regas Esperanton kaj povas gvidi min dum la verkado. Evidentiĝis, ke temis pri Kristján Eiríksson kiun mi neniam sufiĉe dankos pro liaj korektoj kaj kuraĝigoj. Per tiu esploro mi lernis, ke memtradukado estas ofta fenomeno en ĉiuj lingvoj kun kontaktoj kaj ke se oni regas ambaŭ lingvojn kiel leganto oni povas sperti la verkon stereoskopie. Ambaŭ versioj estas originaloj: kelkfoje ili estas glataj speguloj, aliffoje misformigaj kaj redonas alian bildon.

Konklude, mi volas prezenti al vi poemon de Baldur Ragnarsson “Vötn/Akvoj” kun mia esperantigo en la mezo. Espereble ankaŭ vi renaskiĝos. ■

Vötn	Akvoj	Akvoj
<i>Speglar vatnanna renna sífelld inn í hug minn sundrast í örsmáa fleti sameinast í nýjum margvíðum myndum sem hver um sig rúmar eigin veröld veruleika, minninga og drauma.</i>	<i>La speguloj de la akvoj fluas senĉese en mian menson diserigas en mikroskopajn facojn rekuniĝas en novaj multdimensiaj bildoj kiuj ĉiu aparte entenas propran mondon de realo, memoroj kaj sonĝoj.</i>	<i>La speguloj de la akvoj senĉese trafluas mian menson diserigas en mil-mil facojn mikroskopajn rekuniĝas en novaj bildformoj multdimensiaj entenantaj proprajn mondojn, ĉiu aparte, de realeco, memoroj kaj sonĝoj.</i>
<i>Svo fíngerðar eru þær myndir að minnsta hugsun gárar yfirborð þeirra afskræmir samræmi lögunar og lita sveipar tærleikann þéttum þungum skýjum rífur heima þeirra til grunna.</i>	<i>Tiel delikataj estas tiuj bildoj ke la plej eta penso skuas ilian surfacon difektas la harmonion de formoj kaj koloroj kovras la klarecon per densaj pezaj nuboj detruas ilian mondon plene.</i>	<i>Tiel delikataj estas tiuj bildoj ke la plej eta penso agitas iliajn surfacojn difektas la harmonion de formoj kaj nuancoj saturas la serenecon per densaj pezŝvebaj nuboj disrompas iliajn mondojn ĝis ruinoj.</i>
<i>Í svefninum kyrrast speglarnir aftur myndirnar ljóma á nýjan leik veraldir raðast saman</i>	<i>En la dormo rekvietiĝas la speguloj la bildoj brilas refoje la mondoj kunmetiĝas</i>	<i>En la dormo sian kvieton reakiras la speguloj la bildoj brilas denove mondo kunordiĝas</i>
<i>biða nýs hruns að morgni.</i>	<i>atendas novan kolapson je mateniĝo.</i>	<i>atendas novan pereon je mateniĝo</i>

MALGRANDA LINGVO KUN GRANDAJ POVOJ

Siru Laine

finna tradukistino kaj lingvistino, nuntempe loĝanta en Barcelono



“Sed kial vi decidis studi la islandan? Ĝi tro malfacilas kaj tute ne utilas!” Se oni donus al mi unu eŭron por ĉiu fojo, kiam mi aŭdas tiajn komentojn, mi povus trankvile igi ĉiujn esperantistojn dumvivaj membroj de UEA. Preskaŭ ĉiam tiaj komentoj venas de personoj, kiuj neniam eĉ klopodis studi tiun ĉi unikan kaj ravan lingvon.

Lerni la islandan estas unu el la aferoj en mia vivo pri kiu mi plej multe fieras. Kiam mi decidis translokiĝi al Islando, mi estis 19-jaraĝa, sufiĉe naŭva knabino kiu eĉ ne sciis kiel diri “jes” aŭ “ne” en la lingvo de mia nova loĝlando. Post ses jaroj mi fine skribis mian magistran tezon en la islanda, sed la vojo ĝis tiu momento estis longa kaj malfacila – kvazaŭ mia propra sagao.

Antaŭ ol lerni la islandan, ĝi ĉiam ŝajnis tre mistera kaj magia – tute alia ol la dek fremdaj lingvoj kiujn mi jam studis en Finnlando. La magio ne estis kaŝita en la strangaj, kromaj literoj kiujn la islan-

da konservis, sed ankaŭ en la molaj sonoj danke al multaj diversaj vokaloj kaj aspiracioj. Mi havas grafemo-koloran sines-tezion kaj asocias vokalojn kun koloroj, kaj por mi la islanda estas kiel ĉielarko; pro tio mi tute ne hezitis, kiam mi havis la eblecon labori en Islando kiel gast-vartistino.

Dum mia unua jaro en la “insulo de la diablo”, kiel la lokanoj ĝin nomas, mi loĝis en eta vilaĝo nomita Eyrarbakki apud la Atlantiko kaj pasigis la tagojn kun kvar etaj knaboj. La unuajn tri monatojn mi parolis al ili mikson inter la sveda kaj la germana, sed sufiĉe baldaŭ lernis komuniki

en la islanda ĉar oni uzas subtekstojn en la televido anstataŭ dubladon. Kaj miaj etaj islandaj “fratoj” estis tre taŭgaj instruistoj – tamen, kiam mi eniris la universitaton la sekvan jaron, miaj profesoroj tuj komprenis ke mi lernis la islandan kiel gastvartistino ĉar laŭ ili mi parolis kiel kvinjarulo!

Mi studis en la universitato dum kvin jaroj; unue tri jarojn por la bakalaŭra diplomo en la islanda kiel dua lingvo kaj poste du jarojn por la magistra diplomo en tradukado - kun duonjaro en Sardinio por Erasmus-interŝanĝo, kie mi studis interalie la islandajn sagaojn en la malnovnordlanda lingvo. Kvankam mia studado ne estis facila pro diversaj kialoj, kiel forta deprimado, la islanda neniam perdis sian fascino; la volo paroli ĝin bone kaj lerni ĉiujn historiajn aspektojn de ĉi tiu nordgermana lingvo, ĉefe ĝian evoluon, pelis min tra la malfacilaĵoj.

La islanda malfermis al mi pli da pordoj ol mi iam povis eĉ imagi. Ne temas nur pri tio, ke mi povu paroli ĝin bone, sed ankaŭ pri la kompreno de la preskaŭ nekredebla historio de la islanda popolo, la vikingoj kaj la norda hemisfero dum la lastaj mil jaroj. Kun mia kono de la lingvo mi ankaŭ esperas fari mian parton en ĝia konservado; ĝi havas proksimume nur 315 000 parolantojn en la tuta mondo, kaj pli kaj pli ofte la islandaj junuloj uzas la anglan inter si. Bonŝance oni agnoskas tiun ĉi problemon kaj fervore laboras pri ĝi, ekzemple kreante neologismojn anstataŭ preni vortojn rekte el fremdaj lingvoj kaj kontrolante ke oni uzu la islandan ĝuste en la ŝtataj amaskomunikiloj.

Dum la Universala Kongreso en Rejkjaviko en 2013 mi havis la plezuron instrui enkondukan lingvokurson de la islanda. La kongresa programo estis plena je interesaj prelegoj kaj aliaj eroj, kaj specife pro tio estis koruso vidi kiom da kongresanoj partoprenis la islandajn lecionojn ĉiutage. Nu, esperantistoj ĝenerale estas lingvemuloj, sed ĝojigis min vidi la plenan salonon tagon post tago.

”
Kun mia kono de la lingvo mi ankaŭ esperas fari mian parton en ĝia konservado

”
Mi sufiĉe ofte laboras kun islandaj tradukoj ĉar denaskaj fakaj tradukistoj simple ne ekzistas. Tiu tamen estas ofta problemo kun multaj malgrandaj aŭ minoritataj lingvoj

”
Ne temas nur pri la modeco de pli grandaj, tutmondaj lingvoj, sed ankaŭ pri la malfacileco por eklerni etajn lingvojn, kiel la islandan, pro manko de fontoj, kursoj kaj materialoj

”
Kiam mi parolas la islandan, mi ne nur fieras, sed ankaŭ sentas min hejme – kie ajn mi estas



Nuntempe mi loĝas en Barcelono kaj fakte neniam povas paroli la islandan, sed mi uzas ĝin skribe ĉiusemajne – mi estas memstara tradukistino kaj specialisto en medicino, kaj sufiĉe ofte laboras kun islandaj tradukoj ĉar denaskaj fakaj tradukistoj simple ne ekzistas. Tiu tamen estas ofta problemo kun multaj malgrandaj aŭ minoritataj lingvoj, bedaŭrinde... sed ne temas nur pri la modeco de pli grandaj, tutmondaj lingvoj, sed ankaŭ pri la malfacileco por eklerni etajn lingvojn, kiel la islandan, pro manko de fontoj, kursoj kaj materialoj. Kaj la geografia distanco certe ne helpas!

La islanda kaj ĝia lernado estas tute neantaŭvidebla aventuro, kiu riĉigas la vivon en pluraj aspektoj ankaŭ se oni ne nepre atingas altan nivelon. Ĝi ŝanĝis mian vivon porĉiame kaj estas grava parto de tiu, kiu mi estas hodiaŭ. Kiam mi parolas la islandan, mi ne nur fieras, sed ankaŭ sentas min hejme – kie ajn mi estas. ■

LUDOJ, LAŬDOJ, LAŬROJ

Carlo Minnaja

akademiano, matematikisto, eseisto kaj historiisto

Carmina non dant panem (sed labor et industria): poemoj ne donas panon (sed laboro kaj agado). Se tia maksimumo rezistas jam almenaŭ du jarmilojn (trovebla jam ĉe Petronio en la Nerona tempo), kaj ĝi trovas konfirmon ĉiupaŝe tio signifas, ke ĝi priskribas realan, konkretan situacion.

Kiam aperis la anonco pri la “laŭro” de la Akademio de Esperanto por verko, kiu devas laŭregulare “esti arte signifa, lingve perfekta kaj evidente kontribui al evoluigo de esperantlingva kulturo”, tuj pluraj komentis, ke kompenso de 100 eŭroj, eksplicite menciita en la regularo, estas neadekvata, precipe se komparata kun la premioj de la Belarta Konkursoj (BK) mastrumataj de UEA, kie unua premiito por poemo, eĉ sen minimuma longo, ricevas 260 eŭrojn kaj eĉ tria premio ricevas 104 eŭrojn, kaj libro por infanoj povas ricevi pli ol 500 eŭrojn. Ja en socio tre konkurema, la plej facila valorparametro estas la mono: se iu gajnas tiom da eŭroj, kaj alia malpli, evidente tiu socio konsideras la unuan pli grava ol la duan. Premiita verko povas atingi pli bonan vendadon, kaj se estis kontraktitaj tantiemoj, tio finance helpas al la aŭtoro.

La vikipedia paĝo pri esperanto-premioj (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Kategorio:Esperanto-premioj>) listigas dek kvar titolojn, plus du

subkategorioj, do ŝajne estas eĉ abundo por honorii niajn homojn. Kiel pri la “ora pilko” ĉe futbalo, certa grupo da influaj personoj, jen UEA, jen aliaj asocioj, jen revuoj lanĉas premion, kiu akiras dum la jaroj sian propran prestiĝon tra daŭra skrupula administrado; kelkaj bedaŭrinde estingiĝis diverskaŭze, ne laste pro manko de mono, kiel premio OSIEK aŭ stipendio Ivo Lapenna, aŭ pro la estingiĝo de la institucio ĝin administranta, kiel ĉe AIS Sanmarino. Estas cetere rimarkinde, ke estas pluraj, mi eĉ dirus vere multaj landaj premioj ne troviĝantaj en la menciita listo, krom se oni ilin spuras tra ligoj al aliaj retejoj. Jam nur en Italio estas almenaŭ deko da ili, kiuj honoras la neforgeseblan “panjon” de la literatura rondo “La Patrolo”, Clelia Conterno, aŭ la same neforgeseblan prezidinton de UEA, Giorgio Canuto, aŭ malpli renomajn malavarajn donacintojn, kiel Pier Luigi Marelli aŭ Domenico Trombetta.

Iuj premioj, aŭ simple honoraj titoloj, havas relative longan historion. Pri la katalunaj “Floraj ludoj”, gloraj dum jardekoj, pri la “natura floro” kaj pri la “florludaj majstroj” ne decas, ke eksterlandano kia mi parolu ĉi tie: ampleksa raporto pri ties komenco en 1908 kaj fino en 1993 legiĝas en https://eo.wikipedia.org/wiki/Internaciaj_Floraj_Ludoj.

“Esperantisto de la jaro” estas honora titolo atribuita ĉiujare ekde 1998 de la

gazeto *La Ondo de Esperanto*; ĝi estas aparte diversfaceta pro la abundo de proponantoj kaj la amplekso de la internacia ĵurio. La koncerna vikipedia paĝo https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperantisto_de_la_Jaro/kandidatoj montras ankaŭ la nombron de ricevitaĵoj voĉoj; subtila komentario de la artikolinto diras: “Ke iu elektita en iu jaro fariĝas elektanto estas memkomprenebla. Pli surpriziga estas, ke iuj personoj estis foje samjare kaj kandidatoj kaj proponantoj aŭ elektantoj.” Nu, fatale: ni esperantistoj estas tro malmultaj por flegi ĉiujn meritplenajn iniciatojn, tial preskaŭ neeviteblas, ke elstaraj personoj produktas elstarajn verkojn indajn je premioj kaj poste, ĝuste ĉar ili estas elstaraj, troviĝas en (pluraj) ĵurioj. Same fatale, nomoj de elstaruloj abunde ripoŝiĝas inter la premiitoj diverstipaj.

Aparte interesa estas listo de esperantistoj en la periodo 1887-1997, kiuj, laŭ eseo de J. Alcalde gajninta honoran mencion en la BK en 2017, estus povintaj aspiri al la titolo “Esperantisto de la jaro”, se ĝi estus ekzistinta tiam (kvankam kelkaj nur loze ligitaj al esperanto): prave kaj simpatie li memorigas kune, por la jaro 1993, la kvar verkintojn de *Ibere libere* kaj la paron Giorgio Silfer kaj Perla Martinnelli pro la akceptiĝo de la Esperanta PEN-centro en la internacian PEN. Tiu listo, kun kelkvortaj sed tre esprimivaj motivaĵoj, ampleksanta 110 jarojn, montras al kiom da personoj (centoj!)

ni posteuloj ŝuldas la plukonservon de la esperanta afero kaj ĝian alvenon ĝis ni. Honoron al ili!

Premio Grabowski, administrata de UEA, ekzistas ekde 1984 kaj celas subteni la esperantan kulturon; ĝi ĉiujare, kun kelkaj transsaltoj, disdonas al la premiitoj (eĉ ne nur unu ĉiujare) sumojn inter 150 kaj 1000 eŭroj; ĝi premias kaj subvencias ne nur aŭtorojn, sed laŭokaze ankaŭ instituciojn, kiel ISAE aŭ la jugoslavian Internacian Kulturatan Servon aŭ la Esperantistan Verkistan Asocion, aŭ eldonejojn, aŭ revuojn. La konsisto de la premio, eble plej granda inter la cento da aliaj, kaj la aŭtoritateco de la (nur trimembra) ĵurio, donas al ĝi apartan prestiĝon.

Bedaŭrinde ne ĉiam premio estas ĝojo, eĉ en nia eta mondo de la “nobla hobia”. Malsama juĝo inter fakuloj pri valoro de verko estus tute ordinara, se senpasie prezentata, sed leviĝas polemikoj, envioj, malamoj, agresoj kontraŭ personoj; eĉ la suverena merkato, kiu pro difino estas senpasia, estas kelkfoje misdirektata de libroservoj, kiuj povas sufoki verkon per “atentu: nehavebla!”, ŝildo agace memoriganta pri tre pli tragika “Achtung” kontraŭ specifa etno. Sed leviĝis ankaŭ polemikoj tute preteraj al la valoro de konkursaĵo: jen en 2013 distanciĝo kaj rifuzo de la premio far gajninto kun akuzo (iom ŝveba) pri antisemitismo al unu komisionano (http://www.planlingvoj.ch/Forlaso_PremioGrabowski.pdf).

Por teni ĉi tiun artikolon sur pozitiva ebena mi ne traktas la polemikojn en kiujn entiriĝis UEA en 2016 kaj 2018, sed pozitivan sugeston mi ŝatus doni. En 2021 la komisiono pri la BK nuligis premion, pro detalo koncerne rajton pri unua publikigo, kiun UEA volas teni strikte por si. Tia postulo estas ja ege bizara: fakte iam la BK-premiitaj verkoj aperis en la UEA-revuo la tuj postan septembron; nun, kiam ili estas laŭkontrakte konfiditaj al publikigo en revuo, aperanta nur kvarfoje en la jaro, eventuale kun malfruo, aŭ kiam ili aperas en “Belarta rikolto” kiu havas neniun devigan tempolimon pri rapida aperigo, povas ja tute nature okazi, ke BK-premiita verko kiu premiigis ankaŭ alikonkurse estas publikigita antaŭ ol UEA tion faras. Preferindus ne postuli

traregulara klaŭzon, kiu ligiĝas al tempo, kiun neniuj (kaj certe ne la kompatinda gajninto) povas antaŭvidi aŭ kontroli. Kiel feliĉe, se verkoj aperas kiel eble plej rapide! Longa atendado agacas aŭtorojn, eĉ pli gajnintojn, kiuj pro tiu maloportuna klaŭzo estas blokita.

Ie-tie aperas plendoj ke, rekte aŭ nerekte, atingas premiojn iuj lanĉintoj mem de la konkurso; nu, certe oftaj kontribuantoj de revuo lanĉinta titolon iĝas popularaj ĉe ties legantaro konsistiganta la ĵurion, same kiel eldonejo kun bone organizita distribua kanalo havas pli fortan ŝancon vidi premiitajn siajn aŭtorojn. Cetere, se paroli pri la premio de la Akademio de Esperanto en la intermilita periodo, iuj laŭreatoj estis ja akademianoj. Tute ne estas surprize, ke akademiano produktas verkojn indajn je laŭdoj aŭ laŭroj: ja ĝuste tiun nivelon oni postulu de tiaj personoj!

Ĉu vere tro da premioj? Nu, agnoskon meritis ĉiu, kiu sin dediĉas al la “nobla hobia”.

Tio eble kaŭzis, ke la nuna estraro de la Akademio bezonis fortan stimulon far la Literatura Sekcio, kiu, ne sen malfacilaĵoj, proponis la realigon de la “Laŭro”, starigis tre sukcesan opinisondon inter la gekolegoj pri la dezirindeco de tiu nova premio, verkis malneton de la regularo (poste amenditan de la tuta kolegaro), proponis sepmembran ĵurion (kvin estis la laŭregulare minimuma), kiu estis aprobita kaj kiu surprenis la meritplenan taskon legi kelkmilon da paĝoj por decidi pri la gajninto. Ene de du monatoj post la proklamo de la gajninto la Akademio povus ŝanĝi la ĵurion; la elekto de la ĉijara gajninto levis nur entuziasmajn komentojn, el kio dedukteblas, ke la ĵurio laboris akceptebla bone, kaj venkintan teamon oni ne ŝanĝu.

La praa Akademio de Esperanto fasonis sian premion tre selekte ekde 1914 ĝis 1930; atribuo ne estis ĉiujara, kaj plurfoje la premiitoj estis pli ol unu; entute 17 verkoj, el kiuj 9 estis tradukoj; dufoje gajnis Baghy per poemaro *Preter la vivo* (1924) kaj per novelaro *Dancu, marionetoj!* (1928); same dufoje gajnis Hendrik Bulthuis per romano *Idoj de Orfeo* (1923)

”


Premio Grabowski, administrata de UEA, ekzistas ekde 1984 kaj celas subteni la esperantan kulturon

”

Ie-tie aperas plendoj ke, rekte aŭ nerekte, atingas premiojn iuj lanĉintoj mem de la konkurso

”

La nuna estraro de la Akademio bezonis fortan stimulon far la Literatura Sekcio, kiu, ne sen malfacilaĵoj, proponis la realigon de la “Laŭro” [...] La elekto de la ĉijara gajninto levis nur entuziasmajn komentojn



Miĥaelo Bronštejn. *Mi stelojn jungis al revado*. Impeto 2016.

kaj per traduko de la romano *La leono de Flandrujo* (1930) de H. Conscience.

En 2021 surprizas, ke la kandidatoj estis ne multaj: eble la konkurso estis tro malfrue kaj tro malvaste anoncita, eble, estante nova, sentradicia, ĝi estis mal-multe altira (kaj la modesteco de la sumo same rolis en la nepartopreno). Entute prezentiĝis, eldonitaj dum la lastaj kvin jaroj, 15 verkoj de 10 verkistoj el 10 landoj. Tri verkoj estis eldonitaj en 2016, du en 2017, neniuj en 2018, unu en 2019, naŭ en 2020. Iom magra aliro, certe eĉ la nura, ja amputa sed sole ekzistanta, rubriko “laste aperis” en revuo *Esperanto* havus multe pli da verkoj. Ĉu estas timemo prezenti sin pro tiu premio?

La nuna Akademio atribuis la laŭron por la jaro 2021 al Miĥaelo Bronštejn pro *Mi stelojn jungis al revado*. La atribuo far la ĵurio estis unuanima. Kio kondukis al tiu rezulto? Fakte la verko parolas pri espero poste transiĝinta al sufero, sufero de ni esperantistoj, konsiderataj kiel popolo kunigita de la lingvo kaj de ĝia interna ideo. Ĝi ne estis la unua romano, kies intrigo disvolviĝas en la esperantista medio; jam en *Sen titolo* verkita de Ivan Ŝirjaev fine de la 19^a jarcento tiu medio rajtis esti subjekto de literatura verko. En *Mi stelojn jungis al revado* Bronštejn harmonie kunigas realon kaj fikcion: tiutempaj elstaraj esperantistoj kiaj Lanti, Drezen, Postnikov, Nekrasov ĉirkaŭas la

dolĉan Francine, la energian Ŝlomon. La leganto estas enmergita en la medion de esperantista Sovetio, aŭ de sovetia Esperantio. Jen romano kiu parolas pri ni, esperantaj kaj suferantaj: jen nia romano. Ne surprize, ke jam nun aperis dua eldono.

La fakto, ke la Akademio nur tiom malfrue decidis starigi la premion, kiu estis kiel ebleco en la Akademia statuto jam de pluraj jardekoj, povas esti ŝuldata al diversaj kaŭzoj. Eble ĉefa estis la timo, ke se la Akademio donas premion al iu verko, tio riskas signifi, en la okuloj de la ordinara esperantisto, ke ĝi akceptas ĉiujn eventualajn stilajn apartaĵojn de tiu verko, kaj tio estis tre timata kiam plej famaj estis la verkoj de Karolo Piĉ, el kiuj ja pluraj plenumis la enstatute menciitajn kriteriojn. La manko de mono, menciita kiel obstaklo, aspektis nekomprenebla. Sendube troviĝus personoj kiuj volonte mone subtenus, eventuale donante sian nomon; ekzemple, en la BKoj ekzistas premioj dediĉitaj al Luigi Minnaja, Paula Adúriz, Maria Cuevas, kiujn financis privatuloj honore kaj memore al parenco. Mono neniam mankas, kiam oni vere volas atingi celon, kaj certe eĉ alvoko al mondonaco havas pli da ŝanco por difinita celo ol por “ĝenerala kaso”, kiu perdiĝus en diversmeandraj rojoj, nekonataj al la donacantoj.

Feliĉan legadon! ■



MALFERMITA LETERO AL ĈIUJ ESPERANTO-POETOJ

Valentin Melnikov

akademiano, poeto kaj literaturkritikisto

Ĉiu senescepte esperantisto, lerninte la lingvon, tre baldaŭ provas verki versaĵojn en Esperanto. Evidente, la lingvo mem inklinigas al poezio. Versaĵoj kreigas abunde, ili estas deklamataj en kluboj kaj kongresoj, aperas en gazetaro. La malnova deziro de fama rusa poeto Vladimir Majakovskij – “ke estu pli multe da poetoj, bonaj kaj diversaj” – en Esperantujo plenumiĝas pli efike ol aliloke. Tamen... “diversaj” poetoj ja pli multas ol bonaj. Ofte oni sentas bezonon versi, sed ne havas eĉ elementajn sciojn pri poezia tekniko. Aŭ eble oni lernis poezian teknikon de sia nacia lingvo kaj provas apliki ĝin por Esperanto – sed tio similas veturon en trajno kun uzo de horaro de busoj, ja ĉiu lingvo havas siajn leĝojn. Verkoj pri Esperanta poezia tekniko troveblas, se oni bone serĉas: “Par-nasa gvidlibro” de K.Kalocsay, G.Waringhien kaj R.Bernard estis kelkfoje reeldonita; same ankaŭ la libreto de K.Kalocsay “Kiel verki kaj traduki poemojn”. Do mia modesta tasko estas konatigi vin kun bazaj principoj de verkado kaj doni kelkajn rekomendojn, antaŭ ol vi ekos serĉi kaj studi la menciitan literaturon. Certe mi turnas min al diligentaj personoj, kiuj konsentas, ke ajnan aferon indas fari bone aŭ tute ne fari kaj subtenas la faman eldiron pri 1% da talento kaj 99% da “nigra” laboro.

”
Mi turnas min al diligentaj personoj, kiuj konsentas, ke ajnan aferon indas fari bone aŭ tute ne fari kaj subtenas la faman eldiron pri 1% da talento kaj 99% da “nigra” laboro

”
Eĉ unusola kruda eraro (ekzemple, manko de necesa akuzativo) en poemo aŭ kanto plene detruas la impreson, eĉ se ĉio cetera bonas

bone aŭ tute ne fari kaj subtenas la faman eldiron pri 1% da talento kaj 99% da “nigra” laboro.

Antaŭ ol temos konkrete pri poezia tekniko, mi ŝatus doni al vi kelkajn pli-malpli ĝeneralajn konsilojn.

Unue. Necesas tute libere regi la lingvon: pensi en ĝi kaj en ajna momento povi vortumi sian penson. Iu atingas la bezonatan nivelon post kelkaj monatoj, alia eĉ post jardeko restas eterna komencanto kaj parolas kun teruraj eraroj. Plejparte tion determinas ne naturaj kapabloj, sed (mal)ekzisto de la stimulo: kiucele tiu persono lernas Esperanton, kion volas ricevi per tio?

Eĉ unusola kruda eraro (ekzemple, manko de necesa akuzativo) en poemo aŭ kanto plene detruas la impreson, eĉ se ĉio cetera bonas. Plej gravas alproprigo de la gramatiko, vi devas “senti” ĝin kaj al kutimiĝi al lingvaj normoj. Malpli gravas la vortprovizo. Se vi ne povas tuj trovi la plej taŭgan vorton, vi povas kviete serĉi ĝin en vortaro – gravas nur ke vi sciis, kion poste fari kun tiu vorto. Kaj eĉ se vi opinias, ke scias ĉiujn vortojn – tut-

egale vortaro devas ĉiam kuŝi sur via tablo, kaj se aperos eĉ ombreto de dubo pri signifo kaj uzo de iu vorto – tuj konsultu vortaron. Kiun? Esperantistoj strebas verki por internacia publiko, la lingvaj normoj devas esti tutmondaj – do ni nepre devas eviti nacian influon. Sekve, vi bezonas “neŭtralan” vortaron. Ideala varianto estas (N)PIV, aŭ ĝia reta versio ĉe vortaro.net. Naci-Esperantajn vortarojn prefere tute ne uzu: eraroj svarmas. Maksimume vi povas preni el ĝi Esperantajn ekvivalentojn por iuj naciaj vortoj – se vi ilin absolute ne sciis –, tamen nepre tuj rekontrolu la signifon de tiuj vortoj laŭ PIV. Esperanto-nacia vortaro utilas nur por rememorigi signifon de iu Esperanta vorto, aŭ se vi ne komprenas difinon en PIV (foje tio okazas, precipe se temas pri nomo de konkreta besto aŭ planto). Do uzu ĝin kun singardo. La malgrandajn poŝvortarojn absolute ne uzu: strebu riĉigi viajn sciojn! Ne decas resti je nivelo de komencanto, se vi pretendas iĝi granda poeto (kaj se ne pretendas – do kiudiable verki?!).

Due. Sobre pritaksu viajn kapablojn. Se vi volas verki originale – pensu: ĉu vi havas kion diri al la publiko, ĉu vi diros ion efektive novan, neniam antaŭe diritan de aliaj poetoj? Ĉu vi kapablas trovi freŝan ideon kaj temon, nebanalan komparon? Se vi ne certas pri tio – do prefere komencu per tradukoj, kvankam tio eĉ pli malfacilas el teknika vidpunkto. Se vi tradukas – do ĉiam memoru: altkvalita originalo postulas same altkvalitan tradukon. Vi devas transdoni la enhavon, la stilon, la sentojn de la originalo, ankaŭ la sonimpresojn. Se tradukisto mem, eĉ legante sian tradukon laŭpapere, stumblas kaj ne povas elparoli vortkombinojn, tamen asertas ke tio estas versaĵo de Puŝkin (la plej fama rusa poeto) – kompaton meritas kaj la tradukisto, kaj Puŝkin...

Certe, atingi pli-malpli altan nivelon eblas nur per praktika laboro – sed tio ne signifas, ke ĉiujn rezultojn de via laboro indas prezenti al vasta publiko. Estu vi mem la plej severa kritikisto de viaj verkoj, por ne honti poste!

Triē. speciale por tiuj, kiuj verkas aŭ tradukas kantojn. Se leganto de poemo trovos en ĝi nekonatan vorton – li povos konsulti vortaron kaj daŭrigi la legadon jam kun plena kompreno. Dum kantado aŭ deklamado tio ne eblas: se aŭskultanto ne komprenis iun vorton aŭ gramatikaĵon – la senco forglitas kaj la impresado estas fuŝita. Do en kantotekstoj oni devas uzi nur komune kompreneblajn vortojn. Bezonatas saĝa kompromiso – ke via kanto ne estu, unuflanke, tro primitiva, kaj, aliflanke, – tro elitisma, kun amaso da nekompreneblaj vortoj. Eble vi povas iom riski per komplika teksto, se vi certas ke vian kanton oni ŝatos aŭdi plurfoje (pro bela muziko, majstra plenumo ktp.) kaj iom-post-iom parkerigos kaj plenkomprenos. Sed povas okazi, ke eĉ multfoja aŭskultado ne helpas komprenon: la cerbo kvazaŭ malŝaltiga. Oni aŭdas la vortojn en Esperanto, komprenas ĉiun aparte – sed tute ne povas poste diri, pri kio estis la kanto. Do ankaŭ troa filozofiemo en kantotekstoj evitiindas. Fakte, trovi la kompromison helpas nur arta gusto – nature, se vi posedas ĝin...

Kvare. Ne ripetu en mallonga versaĵo samajn vortojn. Tio pravigeblas nur, se la vorto estas “ŝlosila”, esprimas gravan specifan ideon. Aliokaze uzu sinonimojn, ili en Esperanto pli abundas ol ŝajnas al pigra komencanto. Tamen neniokaze elpensu proprajn “neologismojn”, prefere diligente foliumu vortarojn. Ne indas inventi biciklon...

Kvine. Evitu vortojn miskompreneblajn pro fuŝa prononco – ke “l’ amo” ne iĝu “lamo”, “pland” ne miksiĝu kun “plant”, “aŭtenta” ne estu “aŭtenta” ktp.

Sese. Zorgu pri belsoneco. Memoru, ke flue elparoli oni povas ne pli ol du konsonantojn sinsekve, maksimume tri, se inter ili estas “r”. Do por eviti neprononceblajn amasiĝojn de konsonantoj, estu atenta kun apostrofoj. Uzu ilin nur en vere necesaj okazoj kaj ne pli ol po unu en unu verslinio. Ankaŭ pri kunmetitaj vortoj estu aku-

rata, pro la sama kaŭzo. Atentu, ke en verso ne staru proksime unu al alia diversaj siblaj sonoj, evitu esprimojn kiel “ĉu ŝi ĝis nun...”

Fine sed ne laste. Lastatempe disvastiĝis kaj modiĝis t.n. “liberaj” versaĵoj – sen rimoj, sen ritmo kaj plej ofte preskaŭ sen senco. Se vi preferas tiajn – do vi miajn konsilojn ne bezonas. Mia opinio (eble iom subjektiva, sed firma – pri kio mi dum multaj jaroj disputas kun anoj de Ibera skolo, precipe kun ties ideologo J.Camacho) estas tamen, ke tio havas neniun rilaton al poezio, samkiel tromodernaj pentraĵoj kun torditaj figuroj kaj nekompreneblaj makuloj neniel apartenas al pentroarto. Simple homo volas montri sin al ĉiuj, ŝajnigi ke li havas talenton (reale neekzistantan), kvankam li pigras studi eĉ elementojn de la metio. Kaj se “li tiel vidas” – do prefere vizitu li koncernan kuraciston... Camacho asertas, ke “parnasismo” (li uzas tiun vorton insulte) apartenas al forpasinta epoko. Mi plurfoje atentigis, ke liaspeca “avangardismo” estis moda en rusa poezio antaŭ 100 jaroj kaj definitive eksmodiĝis antaŭ 50 – sed li aŭdas nur sin mem, kaj insultaĉas ĉiujn malkonsentantojn. Li asertas, ke la sola distingo inter poezio kaj nepoezio estas “aparta, ĝislima kaj translima, vortica uzo de la lingvo, permesanta esprimi aŭ almenaŭ aludi la neesprimeblan” – t.e., lingvaĵo maksimume nenatura, kunigo de nekunigeblaj nocioj, vortjonglado kaj mem-admiro... Nu, eble troviĝas ŝatantoj ankaŭ de tia snobe elitisma poezio, sed certe ne multaj. Fakte eĉ tio ne estas ekstremo. Antaŭ jardekoj mi foliumis poemaron de Jarlo Martelmonto (ĉu iu memoras tiun poeton?), tie min pleje impresis la “poemo” konsistanta el unusola krampo: “(”, sola signo sur tuta paĝo. Dokta literaturologo asertis, ke tio esprimas komencon de ĉio nova, malfermon de la mondo, novajn horizontojn ktp. Mi tamen esperas, ke vi, kara leganto, poezi-ŝatanto kaj eventuala poeto, pensas adekvate.

Bona poezio trovas resonancon en homa animo, oni ĉiam denove re-

venas al ŝatata poemo, ripetas ĝin en diversaj cirkonstancoj, serĉante konsilon aŭ konsolon. Oni parkerigas la poemon en junaĝo kaj povas reciti ĝin post jardekoj – certe, se ĝi indas. Ritmo kaj rimoj estas la plej efika memorfiksilo, kaj se publiko aprezis la poemon – tiu povos vivi jarcentojn. Tamen, ĉu iu kapablas precize reciti ion el nunaj “avangardaj” poeziaĵoj, lozaj kaj plumpaj, almenaŭ duonjaron post tralego? Certe ekzistas trafikaj metaforoj, freŝaj vortkombinoj k.s., tamen kial rifuzi la plej potencon armilon, fidele servantan dum jarcentoj?

Por iom distri kaj pensigi vin, mi ŝatus ilustru miajn tezojn per du miaj malnovaj poemetoj.

EVOLUO

en pratempo la homoj
estis analfabetaj,
poezio vivis
nur en kantoj kaj rerakontoj,
kaj por faciligi
memorfiksadon de poemoj
oni uzis rimojn.
rimoj estas ja
bonega memorfiksilo.

**Kaj se poemo trafas vere
Animon de la homo mem –
Eĉ post jardekoj do parkere
Resoni povos la poem’.**

Nun oni ne bezonas
ŝarĝi mensan memoron –
oni delonge havas paperon,
kaj lastatempe eĉ komputilojn,
do rimoj ne plu bezonatas.
almenaŭ oni diras tiel
aŭ eble oni simple pigras
kaj poiomete
perdas la kapablon rimi,
same kiel oni
ne plu kapablas kalkuli enmense –
ja ĉiu havas kalkulilon...
(cetere, kiom estas 15-oble 18?..)
Ni vivas pli oportune,
pli komforte
ol niaj prauloj,
tamen,
ĉu ni estas pli talentaj ol ili?
Ĉu pli feliĉaj?

Kaj iom malpli serioze:

AL ĈIUJ, KIUJ KONSIDERAS SIN POETOJ

Jen estas mi – poeto brila.
Mi laŭ supera dia vol’
Kun la misio malfacila
Aperis antaŭ la popolo’.

Mi volas havi idealon,
Sed idealo estas jam
Mi mem, kreanta madrigalon
Pri kor-dolor’ kaj amo-flam’.

Tamen pardonu,
Mi forgesis ke
Poemojn kun ritmo kaj rimoj
Oni jam opinias eksmodaj.
Necesas verki avangarde,
Laŭeble ke neniu
Rimarku ian sencon.
Sed ne konfesu tion.
Nu, mi povas ja!

Nigra suno de mia eno
Eliĝas pogute,
Knarante per dentoj.
Mi sensas la mondon traliki
Tra miaj vejnoj.
Mi destinas savi la mondon.
La mond’ ‘as mi!

Impete, verve kaj sen halto
Mi iras kun tambur’ sur kol’.
Virinoj ĉiuj kun ekzalto
Flustretas: “Jen la seks-simbol’!”

Mi estas Alfa kaj Omega,
Mi estas rok’ kaj mara ond’.
Egoo mia, vere ega
Pri mi kriegas al la mond’.

Ke vi ne havu iluzion,
Asertas mi kun plena cert’:

Mi sola kreas Poezion,
Ceteraj ĉiuj estas merd’!

Kaj nun, se mi ankoraŭ ne fortimigis vin
de poemkreado – penu trovi la supre-
menciitajn verkojn pri poezia tekniko,
atente studu ilin, ekzercu – kaj poste
montru, kion vi kapablas...■

”

Sobre pritaksu
viajn kapablojn.
Se vi volas verki
originale – pensu:
ĉu vi havas kion diri
al la publiko,
ĉu vi diros ion
efektive novan,
neniam antaŭe
diritan de aliaj
poetoj?

”

En kantotekstoj
oni devas uzi
nur komune
kompreneblajn
vortojn

”

Neniokaze
elpensu proprajn
“neologismojn”,
prefere diligente
foliumu vortarojn.
Ne indas inventi
biciklon...



Lola Casas

BIBLIOTECA DE VILADECANS

RACÓ DE POESIA

Alfons Tur

membre de KEA i denaska esperantisto

Al XXXVII Congrès Català d'Esperanto que va tenir lloc a Mataró l'any 2015 s'havia programat, com una activitat més, una lectura de poemes de Lola Casas que havíem traduït a l'esperanto. Malauradament, per aquelles coses de la vida, l'activitat no va arribar a fer-se, però la matèria primera, que eren les poesies originals i la traducció, hi era, i l'entusiasme de la Lola també, així que no ens hem pogut estar de publicar-ne un petit tast perquè en gaudiu.

Per als qui no la conegueu us fem una mínima presentació de l'autora: Lola Casas (Mataró 1951), mestra de primària jubilada però en actiu, es considera una mestra que escriu poemes. De caràcter infatigable, té més de 60 obres publicades entre assaigs, contes i poesia per a públic infantil i juvenil. A més a més, alterna la tasca d'escriptora amb la de formadora i conferenciant sobre literatura. Fa ben poc ha publicat una autobiografia amb un títol que ho diu tot: *La nena que volia ser mestra*. ■

En la 37-a Kataluna kongreso okazinta en Mataró en la jaro 2015 estis antaŭvidita kiel kongresa aranĝo deklamado de poemoj de Lola Casas kiujn ni esperantigis. Bedaŭrinde, la programita ero ne sukcesis sed la krudmaterio restis, la originalaj poemoj, la tradukoj kaj la entuziasmo de Lola ne malaperis, tiel ni volis proponi etan gustumadon por via ĝuo.

Por tiuj kiuj ne konas ŝin, jen eta prezento de la verkistino: Lola Casas (Mataró 1951): Bazedukada instruistino nun jam emerita sed daŭre aktiva, ŝi difinas sin kiel instruistino kiu verkas poemojn. Nelacigebla, ŝi publikigis pli ol 60 verkojn, inter ili eseojn, rakontojn kaj poezion por infanoj kaj gejunuloj. Krome ŝi samtempe gvidas atelierojn kaj prelegojn pri beletro. Laste aperis ŝia aŭtobiografio kies titolo ĉion klarigas "La knabino kiu volis fariĝi instruistino". ■

NIT¹

El firmament és coixí de lluernes,
 on la Lluna s'endormisca
 en el moment de l'albada.
 El cel és teranyina de punts de llum,
 on la Lluna és una aranya
 que llaura constant i endreçada.
 L'espai és fum de pluja de vidre,
 on la Lluna neix joiosa,
 ben blanca i empolainada.
 El vespre és partitura,
 on els astres de la Nit
 componen amb fil de plata
 una cançó inacabada.

RESPOSTES²

Mare,
 per què la Lluna és tan clara?
 Perquè el fred de l'espai
 li ha empolsinat la cara.

Pare,
 per què un ocell vola?
 Perquè l'aire jaganer
 cel amunt el bressola.

Avi,
 per què s'enlaira un avió?
 Perquè ha volgut ser gavina
 i trobar el llunyà horitzó.

Àvia,
 per què la sang és vermella?
 Perquè ha triat de les flors
 l'esclat i el color de la rosella.

No em van ensenyar
 a ser un científic,
 però em donaren
 ales de poeta.

NOKTO

Firmamento, lampira kuseno
 kie la Luno ekdormetas
 ĉe la sunleviĝo.
 Ĉielo, lumpunkta araneaĵo,
 kie la Luno araneas
 senĉese kaj zorge pluganta.
 Spaco, fum' el fajna vitra pluvo
 kie la Luno feliĉa aperas
 tute blanke ŝminkita
 Vespero estas partituro
 kie la Noktaj astroj
 komponas arĝentfadene
 neginan kanton.

RESPONDOJ

Panjo,
 kial la Luno tiom helas?
 Ĉar la malvarmo de la spaco
 farunigis ĝian vizaĝon.

Paĉjo,
 kial flugas la bird'?
 Ĉar l'aero ludeme
 ĉielen ĝin luladas.

Avĉjo,
 kial ekflugas aviadil'?
 Ĉar mevon volis estiĝi
 kaj preter nuboj perdiĝi.

Avinjo,
 kial ruĝas la sango?
 Ĉar el la tuta florbunto
 ĝi elektis papavan brilon kaj ruĝon.

Ili neniel vekigis en mi
 scienceman pensmanieron
 sed male donacis al mi
 orajn parnasajn flugilojn.

1 CASAS, Lola. *Nit*. Barcelona: Publicacions de l'Abadia de Montserrat, 2007.

2 CASAS, Lola. *Retalls poètics*. Barcelona: Publicacions de l'Abadia de Montserrat, 2001.

SOLARIS

LA MONDFAMA SCIENCFIKCIA ROMANO DE STANISŁAW LEM, NUN EN ESPERANTO

Pere Fornells

industria inĝeniero, loĝanta en Anoia, esperantisto ekde 2013



Solaris, de Stanisław Lem (Polando, 1921–2006), unu el la plej klasikaj sciencfikciaj romanoj, aperis en esperanta traduko. Eldonita en 1961, ĝi apartenas al la sciencfikcia pli filozofema subgenro, kiu cerbumas pri homaj kapabloj, limoj kaj reagoj vide al nekonataĵoj. Sendube ĝi estas unu el la plej famaj kaj influaj sciencfikciaĵoj de la 20a jarcento, tradukita en multajn lingvojn (en la kataluna eldonis ĝin Editorial Pleniluni en 1988) kaj trifoje adaptita al kino (1968 kaj 1972 en Sovetio, 2002 en Usono). Finfine eblas legi ĝin ankaŭ en esperanto per eldono de Bjalistoka Esperanto-Societo kaj tradukado de ĝia prezidanto, Przemysław (Przemek) Wierzbowski, kiu afable respondis kelkajn demandojn de *Kataluna Esperantisto*.

Solaris estas rakonto pri renkontiĝo kun fremda intelekto, tiom malsimila, ke ajna interkompreno, eĉ interkomunikado, ŝajnas preter homa kapablo. La ĉefrolulo aŭ iamaniere efektiva heroo de la romano estas Solaris, planedo de du-stela sistemo, kies orbito estas nenature stabila. Laŭ vortoj de Przemek, Solaris “estis malkovrita cent kelkdek jarojn antaŭ la okazaĵoj prezentitaj en la intrigo. Ĝian surfacon kovras oceano, kiu kapablas konstrui plej diversajn, gigantajn, efemerajn, malfacile klaseblajn kreaĵojn. La disĉiploj de la nova scienco, solaristiko, provante kompreni kaj sciencdifini la naturon de Solaris, formulas foje ridindajn, foje verŝajnajn, sed neniam pruvitajn teoriojn, kiuj amase okupas la bibliotekojn. Unu el la solaristoj estas la psikologo Kris Kelvin

sendita al la Stacio ŝvebanta super la planedo por esplori kio okazas ĉe la tieaj sciencistoj. Baldaŭ la okazaĵoj superas lian imagon, kaj iu neŭtrina kreaĵo estas rekte ligita kun lia propra pasinteco”. Ni nenion aldonos, ĉar kompreneble oni ne tro devas malkovri al tiuj, kiuj ankoraŭ ne konas la verkon.

Havante la ŝancon paroli kun la tradukisto, ni taksis interese demandi lin pri tiu tasko, pri specifaj problemoj rilataj al esperantigo de sciencfikciaĵoj, kaj pli ĝenerale, pri pola literaturo en Esperanto. Jen la rezulto. Przemek laboris pri Solaris dum pli ol jaro, sed neregule, kun paŭzoj kaj revenoj. Oni povas pensi, ke vortaro rilata al tiu sciencfikcia medio estas granda defio. Kaj ĝi certe estis, sed ne tiom: “ian defion prezentis traduko de sciencaj vortoj, kiuj rilatas al tekniko kaj astronomio” sed, “kompare kun multaj aliaj verkoj de Lem, Solaris ne estas tiom plena de neologismoj kaj nekutimaj parolturnoj; la romano estis verkita en la norma pola lingvo, kvankam 60-jara”. Aliaj zorgigaj aferoj rilatas al verkstilo de la aŭtoro: “certa specifaĵo de Lem estas la uzado de longaj frazoj, kiujn mi deziris laŭeble konservi por redoni la etoson” kaj al lingvo mem, kies trajtoj devigas pensi pri aferoj tute fremdaj por ni katalunlingvanoj: “interesa malfacilaĵo estis la nomoj de pluraj personoj: kiam ili estis menciitaj en akuzativo aŭ alia gramatika kazo, necesis ŝanĝi ilin en nominativon, kio ne nepre estis aŭtomate farebla”.

En la nuna epoko Bjalistoka Esperanto-Societo estas tre aktiva, kaj tiel

okazas ankaŭ rilate al eldonado. Rilate al pola literaturo en Esperanto, ĝi ĉiujare eldonas la libron elektitan por la Pola Nacia Legado (evento okazanta kutime ĉirkaŭ la komenco de septembro). Tiel, en 2021 aperis *Ŝuistoj* de Witkacy kaj pli frue *Baladina* de Juliusz Słowacki kaj *Antaŭprintempo* de Stefan Żeromski. Malgraŭ tiuj eldonoj kaj la ebleco trovi en Esperanto aliajn klasikaĵojn de pola literaturo (ekzemple *Quo Vadis* de Sienkiewicz kaj *Faraono* de Prus) laŭ Przemek “necesas konstati, ke la pola literaturo estas nesufiĉe konata de la Esperanto-legantaro kaj mankas personoj, kiuj dediĉas sian tempon al elpoligado de legindaj verkoj”.

Nuntempe, li ne laboras pri alia traduko. Li decidis traduki Solaris “pro forta persona ligo al la verkaro de Stanisław Lem” kaj ĝuste tial li ne volas diri, ke jam ne plu li tradukos: “Mi volonte tradukus alian romanon de li, ĉar labori super liaj tekstoj estas nekredeble kontentiga afero”. Pri tio, kial, inter la vasta verkaro de Lem, Solaris estas la plej fama romano, li opinias, ke “verŝajne antaŭ ĉio pro tre unika prezento de la fremda estaĵo: Lem sugestas, ke en la kosmo, kiun ni apenaŭ konas, la aliulo estos tiom malsama al ni, ke kompreni ĝin estos neeble”.

Por aĉeti Solaris, oni povas mendi ĝin ĉe la retpaĝo de la eldondisto, Bjalistoka Esperanto-Societo: <https://espero.bialystok.pl/eo/produkt/solaris>. Eblas trovi ĝin ankaŭ en la libroservo de UEA kaj en aliaj vendejoj. ■

PRO ĜUSTECO KAJ JUSTECO

Ana Manero
bibliotekisto

Jes, ankaŭ ili esti tie. Tamen, ne plu videblaj, ofte nekonataj, preskaŭ ĉiam forgesitaj. Jes, ankaŭ ĉe ni tio okazis. Finfine, Esperantujo ne povas ne speguli la eksteran mondon, kvankam kelkfoje ĝi ankaŭ kontribuas, ni esperu, al ĝia plibonigo.

De la pleja komenco virinoj ŝatis partopreni la beletran vivon de Esperanto kaj sukcesis alporti sian sableron al la kreado de komuna kulturo. Estas afero de justeco, ke ankaŭ iliaj nomoj trovu lokon en la historio, por ke ĝi estu ĝuste skribita.

Tial, tiom gravas la apero de ĉi libreto: *Forte verki/Escriure amb força*, kompilita kaj redaktita de Elisabet Abeyà Lafontana kaj Xavier Margais Basi, kiu celas rekuperi el forgeso la nomojn de tiuj virinoj partoprenintaj en la Internaciaj Floraj Ludoj dum la unua triono de la pasinta jarcento. La peno fari dulingvan eldonon estas, miaopinie, trafa decido, kiu certe kontribuos diskonigi ilin ankaŭ ekster nia verda mondeto.

Temas pri poemantologio de ok elektitaj poetinoj premiitaj en la Ludoj. Inter la nomoj de la plej konataj, kiel Ma-

rie Hankel, Louise Briggs aŭ Maria Posenaer, troviĝas aliaj malpli konataj sed same interesaj, kiuj prilumas la tiutempan inan lirikan panoramon en nia lingvo. Kiel komplemento, enestas en la verko listo de aliaj aŭtorinoj premiitaj en la sinsekvaj eldonoj de la konkurso.

Aparte rimarkindas la enkonduko en la historion de la Ludoj, plej interesa manifestiĝo de la kataluna kulturo, kiu sukcesis enradikiĝi en la fekunda esperanta grundo kaj doni, laŭlonge de la tempo, fruktojn same sukajn, kiel en ties originala formato.

La verko aperas en kolekto dediĉita al karmemora Montserrat Franquesa i Gòdia, elstara aktivulino el la kataluna movado, tro frue forpasinta, kies unua numero ĝi estas.

Temas ankaŭ pri plaĉa eldonaĵo. La libro estas tre bele kompostita (evidentas tie la talento de Ferriol Macip) kaj profesiece eldonita.

Kiel virino kaj kiel esperantisto, mi povas nur laŭdi la aperon de ĉi tiu verko. ■



Abeyà Lafontana, E. kaj Margais Basi, X. *Forte verki: Premiitaj virinoj en la Internaciaj Floraj Ludoj (1909-1936) = Escriure amb força: Dones premiades als Jocs Florals Internacionals (1909-1936).* Kataluna Esperanto-Asocio, 2022.

Trovu tiun libron kaj aliajn
en la libroservo de KEA

libroservo@esperanto.cat

PETRO NUEZ AŬ LA BONECO

Ĝangels del Pozo

kun la kunlaboro de Joan Alarcón kaj Martí Guerrero



